Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 14/05/2020 Kvarcentsepdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*

Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*

Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute 733,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **286,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **236,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)

★★★

Estrarkunveno 2020-05-14

Venonta kunveno: jaŭdo 14-a de majo 2020. *Sandor Horvath*

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153 *Roger Springer*

Hispanujo planas Universalan Bazan Enspezon (UBI) por helpsolvi la Kronavirusan Ekonomian Krizon *Roger Springer*

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Ekzamenoj en mia ĝardeno.

LA KRONAVIRUSO: KION NI LERNIS .

Mi supozas, ke ni lernis la jenajn lecionojn el la ĝisnuna traktado de la batalo kontraŭ la viruso.

1e. Ke ni devas prepari nin por sekvonta atako de la sama aŭ de pli nova viruso nemortigebla.
2e. Ke la ŝtat- kaj nacilimoj estu tuj fermataj, sen esceptoj.
3e. Ke ni bezonos havi multe pli da kvarantenejoj ĉe la limoj kaj flug- kaj marhavenoj.
4e. Ke enlasi homojn postulante ke ili sin mem izoligu estas nefidinda kaj kaŭzis la okazojn de transdonado de la viruso.
5e. Ke tial necesas postuli ke ĉiu enlasoto devos unue iri en kvarantenon, sen esceptoj.
6e. Ke estu granda puno por tiuj estroj de organizaĵoj kiuj "forgesas" tuj anonci okazon aŭ suspekton de virusportanto.
7e. Ke pli da medicinaĵoj necesaj estu tuj haveblaj.

Se la registaroj lernos el la ĉi supre menciitaj eraroj kaj avertoj, la viruso venkatos multe pli rapide kaj nia izoladoneceso estos multe pli mallonga.

Marcel Leereveld.

PAPERAJ EKZAMENOJ .

En etnaj lingvoj ni ofte uzas plurajn vortojn por unu signifo. Kelkfoje okazas la kontraŭo: unu vorto por pluraj signifoj; ekzemple la vorto "*fine*" en la angla havas tri malsamajn signifojn.

Etnaj lingvoj ofte havas sencon de humoro. Iam mi legis en universitata ekzameno la jenajn instrukciojn: "*This paper consists of three papers each of which papers to be written on a separate paper*" (Ĉi tiu ekzameno konsistas el tri partoj kiuj ĉiu skribatu sur aparta paĝo).

Antaŭ duona jarcento la aŭstralia Esperanto-asocio ricevis permeson de la Akademio organizi Esperanto-ekzamenojn en Aŭstralio kun niveloj garantiitaj de la Akademio. Dum ĉiu povas verki iun ajn ekzamenon, tiuj de A.E.A. estas garantiataj de la Akademio esti laŭ ilia

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

nivelo. A.E.A. devis submeti provekzamenon, kiun la Akademio akceptis. Post la akcepto A.E.A. elektis Komisiiton por Ekzamenoj, kiu elektas kvinpersonan Komisionon por helpi lin.

La formo de tiuj ekzamenoj, en tri gradoj, estas laŭ la normalaj lernejaj ekzamenoj: skribaj tradukoj el kaj al en Esperanto, demandoj por testi la gramatikan scion, kaj parola ekzameneto. Por ĉiuj demandoj la ekzamenisto donas poentojn, bazitajn sur la nombroj de eraroj. La kompleta nombro, en percentaĵo, decidas aŭ sukceson aŭ malsukceson, je malpost aŭ je post 50%. Oni ne kalkulas, ne bezonas kalkuli, la bonajn respondojn kaj la bonajn tradukojn.

Tiuj Esperanto-ekzamenoj devas esti malfacilaj, ĉar la ekzamenato faras la ekzamenon hejme sen supervido kaj rajtas uzi iujn ajn librojn . Li/ŝi ne rajtas informiĝi pri la demandoj ĉe aliaj personoj. La ekzamenato havas kelkajn monatojn por verki la respondojn.

Antaŭ kvarona jarcento estis mi kiu elektatis kiel tia Ĉefekzamenisto, kaj deĵoris tiel dum multaj jaroj. La tri gradoj de la ekzamenaro estis la Elementa, la Supera, kaj la Klereca. La Elementa, la plej facila, havis ĉiujare du aŭ tri ekzamenatojn. La Supera apenaŭ unu dum jaro, kaj la Klereca multe malpli, ĉar tre malfacila. Se mi bone memoras, momente posedas la Klerecan diplomon nur S.roj Trevor Steele kaj Bob Felby kaj mi.

Post kelkaj jaroj de mia deĵoro mi komencis pripensi ĉu ankaŭ alia speco de ekzamenoj eblas. Mi ja observis la lingvoscion de la neanglaj enmigrantoj en Aŭstralio, kaj vidis, ke la lingva sukceso de tiuj enmigrantoj ne multe dependis de kiom da lingvaj eraroj ili faris en sia uzo de la angla lingvo, sed multe pli de la kvanto de bona lingvo uzata. Se enmigranto scias multe de la angla lingvo sed en sia uzo faras multajn gramatikajn kaj aliajn erarojn, li estas pli sukcesa en siaj interrilatoj kun angloj ol enmigranto kiu scias malpi sed ne faras multajn erarojn en la literumado de la angla lingvo. La scio de Esperanto utilas pli se oni pli flue parolas kaj malgraŭe faras multajn gramatikajn erarojn, ol tiu kiu scias malmultajn vortojn kaj ne faras gramatikajn erarojn. Mi sekve konkludis, ke ni devas trovi kiom da vortoj la kandidato scias kaj kiom da gramatiko li/ŝi scias. Mi do decidis verki tian ekzamenon, en kiu la ekzamenisto serĉas ĉiujn bonajn uzojn kaj ĉiun bonan vortaron kiun la kandidato uzas, kaj forgesu pri la eraroj faritaj, precipe en la literumado de vortoj kaj en la uzo de la gramatiko.

Mi konsekvence verkis kompletajn ekzamenojn por tri niveloj, la Bazan sub la nivelo de la ekzistanta Elementa, la Mezan inter la Elementa kaj la Supera, kaj la Altan inter la Supera kaj la Klereca. En tiuj ekzamenoj, farataj kun supervido ĉar nenia printita aŭ alia helpo estis permesata, la ekzamenisto serĉas nur la uzon de bonaj vortoj kaj malpli la uzon de la bona gramatiko. Juĝi tiajn ekzamenojn tiamaniere prenas multe pli da tempo. Por testi la eblecon de tiaj ekzamenoj, mi donis la Bazan ekzamenon al pli ol deko da membroj de la Melburna E.A., dum du vesperoj, kun mi kiel supervidanto. La templongeco ne gravis, sed ili devis fini antaŭ ol mi iris hejmen. Neniu malsukcesis, sed la kandidatoj devis havi almenaŭ okdek procentojn da sukceso, t.e. da bonaj respondoj, t.e. da ĝustaj vortoj kaj gramatiko. Poste kelkaj faris mian Mezan Ekzamenon. La sukcespunkto estis 80%, ĉar la kandidatoj scias antaŭe, kiuj vortoj de la 400 donitaj povos esti en la ekzameno kaj kiun parton de la gramatiko estas scienda. Por tio la kandidatoj ricevis, longe antaŭ sia ekzameno, la liston de la 400 vortoj (1000 por la Meza) sciendaj kaj la liston de la gramatikaj reguloj sciendaj (ĉiujn por la Meza, sed malpli por la Baza). Teorie ĉiu kandidato povus ricevi 100 procentojn.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Mi ricevis la permeson de preskaŭ ĉiuj membroj de la Ekzamena Komitato, kaj poste de A.E.A., kaj komencis aranĝi tiajn ekzamenojn en la kongresoj kaj somerlernejoj. La supervidataj kandidatoj ne rajtis hejmenpreni la tekston de la ekzamenoj, ĉar mi uzis la saman enhavon en ĉiu posta jaro. Mi enoficigis ekzameniston en kelkaj urboj, kiuj povis aranĝi la ekzamenon ekster la kongresoj.

Ĉiujare faris la Bazan ekzamenon inter dek kaj dudek kandidatoj, kaj la Mezan kelkaj. Tre malmultaj homoj malsukcesis. Entute nur du aŭ tri subiĝis al la Alta Ekzameno. La juĝado de la respondoj kostis al mi multe da tempo, sed mi opiniis ke tio valoris ĉar tiaj ekzamenoj estis tre popularaj. Je la fino de mia deĵoro pli ol la duono de la A.E.A.-membraro posedis diplomon, iun ajn.

Post kiam en 2006 la membraro de A.E.A. permesis al la tiama Estraro elĵeti min kaj aliajn melburnanojn el A.E.A., la ekstra, nova, tipo de ekzamenoj ne plu okazis. Sed la eksperimento estis valora, ĉar ĝi igis la membrojn studi sian Esperanto-scion multe pli intense ol antaŭe. Tre multaj samideanoj deziris havigi al si diplomon, kaj do devis multe studi por tio. Tio alterne puŝis la ĝeneralan nivelon de la Esperantoscio en Aŭstralio. Sed tre malmultaj samideanoj havas la tempon por fari tiun temporaban laboron de organizado kaj juĝado.

Marcel Leereveld.

★★★